# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno.

Temo.

## Ĉio pri naturismo!

Ĉiuj havas kelkajn ideojn kaj ofte pli da demandoj pri naturismo: kial tiuj homoj ne surmetas bankostumojn? Kie ili nudumas? Ĉu naturismo rilatas kun seksumado? Kion ili celas per tiu nudeco? Ĉu naturismo estas leĝa? Ĉu ĝi eblas ie ajn? Ĉu infanoj povas praktiki naturismon? Ĉu naturismo havas pozitivajn aŭ negativajn efikojn sur la fizika kaj mensa sano? Kiuj estas la valoroj de naturismo? Kion naturismo aportas al siaj praktikantoj?
Tiu prelego « Ĉio pri naturismo! » alportos respondojn al ĉiuj tiuj demandoj kaj eable eĉ pli! Post tiu prelego, vi neniam plu iros sur plaĝo sen demandi vin ĉu via kostumo estas la plej bona vestaĵo….

**Kiam:** la 3-an de junio je **18.30** (UTC+2)
**Prelegonto**: Thierry Spanjaard (FR)
**Lingvo**: Esperanto

**Kie: La renkontiĝo okazos rete per Jitsi**

Jen la ligilo:
https://meet.jit.si/moderated/43f7d1610134c4b80b45e5560715ace9e1916f8261e962d99dea0449e8962abd

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

La prelego estas registrota.

# Ni rekomendas

- La 6an de junio 2026 Ludu kun ni!, Brno, organizas E-mental el Prago
- 23an-26an de julio 2026 43-a Pola Esperanto-Kongreso, Bielsko-Biała, Pollando.
- 1-a — 8-a de aŭgusto 2026 111-a Universala Kongreso de Esperanto, Graz, Aŭstrio
- Trapasu KER ekzamenon, montru, ke vi regas Esperanton.

---

# Cetera programo en junio

La 6an **Ludu kun ni!**, *renkontiĝo*, organizas E-mental el Prago

La 10an **Rostumado**, *renkontiĝo, publika parko Božetěchova, je la 16a horo*

La 17an *Ankoraŭ ne agordita. Komuna programo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom, je la 19a h.*

La 24an **Ekskurso al kastelo Veveří kaj digolago***, renkontiĝo, promeno. Komenciĝos je la 16a h.*

Mi dankas al ĉiuj, kiuj kontribuis aŭ ankoraŭ kontribuos printempe al la programo. Mi ankaŭ dankas al tiuj, kiuj inspiris la programon. Kiel vi vidas, nia programo de nia flanko estas jam agordita ĝis fino de junio. Mi petas vin, ke vi jam nun pripensu, kiel vi povus kontribui al nia programo aŭtune. Ju pli da homoj preparos la programon, des pli bunta ĝi estos.

---

Esperantista klubo Brno

Bosonožská 323/15, Brno
Czech Republic

Vi recevis la mesaĝon, ĉar vi estas membro de Esperantista klubo Brno, ĝia favoranto aŭ vi petis aboni invitilojn de nia klubo. Se vi ne estas membro de la klubo, vi povas malaboni tiujn mesaĝojn.

Malaboni

SENT BY mailerlite